



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 24/77 - 16 jun 1977
Aperas ĉiusemajne

PILO-PRESS

ankaŭ dum
la someraj
monatoj
informas!
=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Honora Insigno por D-ro W. Bormann

Paderborn (pp) - La Honora Insigno de Germana Esperanto-Asocio "Pro la Merito" estis transdonita je la fino de la jarĉefkunveno de GEA dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Paderborn al D-ro Werner Bormann, Hamburg, pro liaj meritoj pri la progresigo de la germana Esperanto-movado.

D-ro Werner Bormann estis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio de 1967 ĝis 1977. Li ne plu kandidatis por tiu funkcio.

Tamen la honorigo ne signas la finpunkton de la Esperanto-kariero de d-ro Bormann. Kiel konate, li jam de kelkaj jaroj estas vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio kaj funkciulo en aliaj organizaĵoj. D-ro Bormann ankaŭ estas membro de la Esperanto-Akademio.

Ni deziras al d-ro Bormann bonŝancon kaj sukceson en lia plua Esperanto-agado.

Pilo-Press petas pardonon pro la malfruiginta informo kaj ripetas sian konstaton el n-ro 22/77: "Kiel konate, d-ro Werner Bormann, kiu dum 10 jaroj prezidis la asocion, ne plu kandidatis por tiu ofico. La germana esperantistaro devas danki al li, ke li por tiom longa tempo dediĉis sian forton kaj liberan tempon al la asocio."

Eŭropo ne estas Babilono

Bonn (pp) - En la gazeto "Deutsche Zeitung - Christ und Welt", eldono de la 3.6.77, aperis interesa artikolo pri la lingvopolitiko en la Eŭropa Komunumo. Aŭtoro de la artikolo estas Dr. Harald Haarmann, Hamburg, membro de la komisiono pri lingvodemandoj de la Eŭropa Unuiĝo. Li jam antaŭ sep jaroj informiĝis pri Esperanto okaze de lia laboro pri bibliografio de lingvouzo-rilatoj en Eŭropo.

Enkonduke de sia artikolo d-ro Haarmann konstatas, ke en la naŭ ŝtatoj de la EK vivas pli ol 20 pli aŭ malpli grandaj popoloj kaj etnaj grupoj. Ili ĉiuj parolas sian propran lingvon, tamen multaj ek la lingvoj estas diskriminaciaj. El tio ekestas la revoluciaj regionaj konfliktoj. La aŭtoro pledas por baldaŭa solvo de la lingvo-problemo en la EK. Li ankaŭ mallonge traktas tiu-rilate "artefaritan mondlingvon." La enkondukon de Esperanto en EK li ne opinias oportuna, se ne samtempe tion farus la Eŭropa Konsilantaro kaj UN. Laŭ d-ro Haarmann Esperanto ŝajnas esti predestinata kiel artefarita mondlingvo por universala solvo.

200 ĉe la belga kongreso

Kortrijk (pp) - La belgan Esperanto-kongreson en Kortrijk dum pentekosto partoprenis 200 esperantistoj el 11 nacioj.

Pri Volontula Servo de UEA

Seriozaj interesuloj por la Volontula Servo de UEA, t.e. personoj kiuj pretas sensalajre labori dum certa tempo por la Centra Oficejo de UEA, turnu sin al Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Pri regiona agado

14.4.77

Letero el Hindio

Ĝoje kaj danke, mi ricevis vian leteron de 16.09.76 kaj 4 pakaĵojn da revuoj. Vi pravas pri la utileco de Esperanto por profesiaj celoj. Elektroteknika inĝeniero kiu esperantiĝis de mi estas ĉielen-prenita kiam li translegis la libron (pri komputero kaj aliaj temoj teknikaj) kiun vi sendis al mi. Ni ĉiuj valoras librojn traktantajn pri ĉiuj temoj kaj scienca kaj literatura, per Esperanto. Ni interesiĝas legi revuojn per Esperanto kaj ne nure pri Esperanto. La revuo "Juna Amiko" estas tre ŝatata de ĉiuj ĉi tie pro ĝia simpla stilo kaj interesaj rakontoj, ŝercoj ktp. Tial revuoj de "Juna Amiko" estas bonvenaj, kvankam ili estas malnovaj.

Mi ricevas de tempo al tempo librojn, leterojn, revuojn kaj ĝoje eĉ monon de geamikoj el diversaj landoj. Estas tute ne eble por dankskribi al ili individue. Tial mi estos tre dankema al vi, se vi bonvole aperigu mian peton en revuoj "Esperanto" kaj "Heroldo". Jen estas mia peto:

"Mi, sinjorino SARANATH, tutkore dankas ĉiujn, kiuj sendis al la Instituto de Esperanto ĉe Bangaloro, Hindujo, librojn, revuojn, leterojn kaj foje eĉ monsumon kaj petigas ilin bonvole akcepti ĉi tiun anoncon kiel individuan ateston. Certe via afablega helpo antaŭenigas nian Movadon."

S-ino Haudebine el Francujo gastigis ĉe ni dum unu monato. Ĉi-kune mi almetas la tranĉaĵon pri ŝi el nia gazeto "Deccan Herald". Ni aranĝis ŝiajn prelegojn en multe da lokoj.

Kvankam mi oferis instrui Esperanton senpage en nia hejmo, ne estis respondo. Tial mi faris planon por allogi lernantojn. Pasintjare mi proponis instrui hincan dancarton, kompreneble por nominala pago. Ĉirkaŭ 10 knabinoj aliĝis. Al ili, mi instruas Esperanton. Mi prezentis du-horan dancprogramon, aranĝita de la Leonina Klubo por bonfara kaŭzo de malriĉaj virinoj kaj infanoj. La gajnitan sumon de Rs. 2000 mi donacis por la ĉasita kaŭzo. Nun pli kaj pli da knabinoj aliĝas al la dancklaso. Tio signifas pli kaj pli lernas Esperanton, ĉar mi instruas Esperanton al la dancstudentoj.

Mi pardonpetas por mia malfrua respondo kiu estas la rezulto de mia okupado pri la dancprogramo.

All India Radio invitis min por doni parapolon dum 14 minutoj. Ĝi estos elsendata je Junio 13-a (13-6.77) el Mangaloro - meza ondo 204,1 kaj 277,8 metroj je 7,45 PTM (vespere). Simplaj libroj Esperantaj estas bonvenaj.

Mia edzo kaj mi salutas vin....

Dezirante ĉion bonan al vi ĉiuj, amike via

S-ino Saranath.

Adreso: S-ino Saranath, 103 Borewell Road, WHITEFIELD 562 136, Bangalore District, Hinda Unio.

La letero estis adresita al s-ro Germain Pirlot, Oostende, Belgio

Eŭropa Esperanto-Kongreso 1979 en Saarbrücken?

Saarbrücken (pp) - Sarlanda Esperanto-Liga sondas la eblecojn por okazigi Eŭropan Esperanto-Kongreson en 1979 en Saarbrücken. La ligo turnis sin al la landaj Esperanto-asocioj de Belgujo, Francujo, Luksemburgio, Nederlando kaj F R Germanujo pri ilia opinio kaj eventuala preteco kunagi.

Letero el Maroko

Estimataj gesamideanoj,

mi tutkore dankas vin pro la helpo, kiun vi alportis al ni. Eble vi jam scias, ke la 15-an de decembro 1975 okazis en la liceo de Inezgane prelego pri Esperanto. Ĉirkaŭ 100 grandaj lernantoj, tre interesataj ĉeestis, kaj sekve de tio, pli ol 80 gejunuloj komencis lerni la internacian lingvon, duope, triope, ktp. en mia hejmo.

Mi jam planis aliajn prelegojn, ekspoziciojn, ktp. Ve! Ĉio estis malfruata, kaj devis esti nuligata. Eĉ la kursoj devis ĉesi. Por rekomenci la kursojn, mi devis peti skribitan permeson de la Rabataj aŭtoritatoj. Mi ankoraŭ hodiaŭ atendas la respondon. Mi petas pardonon pro la malfruo de tiu letero; ĝis nun, mi esperis ricevi favoran respondon.

Se vi juĝas tion utila, vi povos

- 1) anonci la ŝtopadon de la por-esperanta agado en Maroko;
- 2) averti pri mia reiro en Francion, kie dum julio kaj aŭgusto, mi gvidos kursojn de Esperanto en labortendaro;
- 3) danki ĉiujn gesamideanojn kiuj helpis nin;
- 4) antaŭdanki ĉiujn gesamideanojn kiuj helpas nin, speciale sendante poŝtkartojn kuragiĝantajn.

Tutkore mi dankas kaj samideame salutas vin

S-ro Emilo Mas, Loisirs Sains, c/o René Masquet,
F-16640 Claix, Francio.

Kursoj de Esperanto en Ekologia Labortendaro

De la 10-a de julio ĝis la 5-a de septembro okazos kursoj de Esperanto en Ekologia Labortendaro proksime de Angulemo, Francio. Detalojn oni povas ricevi de S-ro E. Mas, Loisirs Sains, c/o R. Masquet, F-16440 Claiy, Francio.

Kristnaska Triptiko

Bruselo (pp) - La belga ministerio "Ministerie van Nationale Opvoeding en Nederlandse Cultuur" (B-1000 Brussel Kolonienstr. 29-31) dissendis al Esperanto-gazetoj kaj asocioj unuopajn ekzemplerojn de la ĵus aperinta broŝuro "Kristnaska Triptiko" de Felix Timmermans, tradukita el la nederlanda de E. Paesman. La broŝuron (44 p.) eldonis Esperanto-Grupo "La Verda Stelo", Antverpeno. La ministerio aĉetis certan kvanton por disdoni ĝin senpage al eksterlandaj esperantistoj.

Fervojista renkontiĝo en Stuttgart

Stuttgart (pp) - La fervojistoj-esperantistoj de la fervoja distrikto Stuttgart renkontiĝos sabate, la 25-an de junio, ekde la 11-a horo en la apuda ĉambro de la kantino sur kajo 16 de la ĉefstacidomo de Stuttgart. Post komuna manĝo W. Barnickel, Frankfurt/M, raportos per bildoj kaj sonoj pri la 29-a IFEF-kongreso en Anglujo. La posttagmezo estos je libera dispono. Por la vizito de "Bundesgartenschau" riceveblas rabatitaj enirbiletoj (4,- GM).

Esperanto-ekspozicio en Schwelm

Schwelm (pp) - La 8-an de junio estis malfermita Esperanto-ekspozicio en "Kreishaus" de Ennepe-Ruhr-Distrikto Esperanto-ekspozicio en tri tabloformaj vitrinoj kun la temoj: Esperanto Internacia Lingvo; Literaturo kaj gazetaro; Niaj kontaktoj al 45 landoj. La ekspozicio, kiun aranĝis Esperanto-grupo Schwelm, daŭros ĝis fino de aŭgusto.



Invito al
antaŭmendo

Bleicher-Verlag, Gerlingen, anoncas la aperon de "Amuza legado de Til' Strigospegul'" en la traduko de R. Schulz, por la aŭtuno 1977.

Por antaŭmendo ĝis la 31-a de aŭgusto 1977 validas rabatita prezo de 24,-

GM. La normala librovendeja prezo estos 28,- GM.

Mendojn akceptas ankaŭ Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Esperanto en Radio

Varsovio. La senvir-voĉa tempo de Radio Varsovio ŝajnas esti finita! Jerzy Grum denove ekparolis. - Bone kaj gojige estas ke la leterkesto estas nun disaŭdigata jam jaŭde posttagmeze. Do fakte oni povas aŭdi nun tiun ŝatatan programeron 3-foje. - Bedaŭrinde ne aŭdiĝis la trarigardo de la Esperanto-gazetaro post la 1-a de junio.

La politikaj komentarioj nun pli kaj pli sin okupas pri la komenciĝinta konferenco en Beogrado kaj supozeble tiuj temoj estos ankoraŭ ofte traktataj en la venonta tempo.

Romo. El Romo ni aŭdis i.a. felietonon pri kongreso de gastlaboristoj. Tiun felietonon ni publikigos en la venonta numero de Europa Esperanto-Revuo. La stacio estas pli aŭ malpli bone aŭdebla, bedaŭrinde ĉiam ankoraŭ en konkureco kun Radio Vatikano, kiun ni ĉi tie kaptas bone sur meza ondo. Cetere, la programkajero de RV por junio nun ankaŭ atentigas pri la E-elsendoj sur la titola paĝo! Sur paĝo 4 oni legas ke de la 20.4.76 ĝis 20.4.77 alvenis ĉe la Esperanto-Redakcio de RV 1 246 leteroj el 39 landoj.

Vieno nun ĉiam, sabate vespere kaj dimanĉe matene, estas bonege aŭdebla. La semajna komentario de d-ro Alfred Macher ĉi-foje temis pri la rolo de Aŭstrio kiel azila lando. Ingrid Plazotta kaj Emil Vokal legis plian felietonon de d-ro Karl Beckmann el la Islanda Serio.

Svisa Kurtonda Radio. La elsendoj de tiu stacio ankaŭ estas bone aŭdebla. D-ro A. Baur ĉi-semajne parolis pri la unua flugo svisa tra Afriko. S-ro A. Gacond prelegis denove pri "Esperanto kaj Interlingua". Amika demando: Ĉu vere tiu temo interesas la plimulton de la aŭskultantoj?

Kuraĝu profesiiĝi!

En sia 90-jara historio, la Esperanto-movado vivtenis sin preskaŭ ekskluzive per volontula laborforto kaj malavaraĵ donacoj de siaj membroj. Ne simple vivi, sed dum preskaŭ unu tuta jarcento daŭre prosperi per la grandega investo de amo, - tio estas fenomeno nekonata en la kultura historio de la homaro.

Tamen, la tempoj ŝanĝiĝas! Kvankam la Movado ankoraŭ vivas ĉefe de tiu sama amkapitalo, nun eblas ankaŭ profesie labori por la Internacia Lingvo. Kelkdeko da homoj jam faras tion tra la mondo. Parto de ili estas en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Strange, sed la CO ankoraŭ ne trovis homojn por okupi plurajn vakajn postenojn en la sidejo de la internacia Esperanto-movado. Ankoraŭ estas serĉataj:

librotenisto, sekretario, grafikisto, administranto, librovendisto

kaj eĉ pliaj spertuloj, pri kiuj oni ĝis nun ne aperigis anoncojn. Ĉiukaze, bonvolu rerigardi la anoncojn pri la vakaj postenoj, en la lastatempaj numeroj de nia revuo. Ne gravas, ĉu vi estas virino aŭ viro! Ne gravas ankaŭ, ĉu vi povus posteniĝi kiel volontulo por difinita tempo aŭ kiel profesio por nelimitita periodo. Ĉefe estas, ke vi posedu la necesajn fakajn konojn kaj, ke vi bone regu la Internacian Lingvon. Tamen, plej grave estas, ke vi deziru labori por la Internacia Lingvo, ke vi havu la necesan kuraĝon profesiiĝi sur tiu kampo.

Skribu pri viaj kvalifikoj, talentoj kaj deziroj al la direktoro de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.